Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

*EKO 2017-07 sendita de Budapeŝto, la 12an de aprilo*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

## *Kartvelio kaj Armenio meritas atenton!*

La EKO-komunikoj 5 kaj 6 detale dokumentis la diskutojn en AMO 31 en Kutaisi, Kartvelio, unue la FLAM-analizon, due la sekvon de tio, kiel proponi planojn kaj vojojn surbaze de la analizo. La tria parto de tiuj laboroj okazis en la 3a de aprilo, kiun ni nur nun povas raporti. La nombro de partoprenantoj en tiu konkluda sesio estis malpli ol dum la AMO-seminario, ĉar pluraj jam devis forvojaĝi. Tamen, ni dokumentas la protokolitajn rekomendojn, samtempe de AMO 31 kiel ankaŭ de la 10a MK.

**=======================**

## *Konkluda sesio de la 10a Mezorienta Kunveno*

La partoprenintoj alvokas al UEA, ILEI, TEJO kaj aliaj establitaj agantoj apogi la evoluigon de Esperanto tra la regiono de la ĵusa Kunveno. La plimulto el la konkludoj fontis el la diskutoj en la 31a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO).

**Lingvaj Festivaloj**
Evoluigi la koncepton de Lingvaj kaj Kulturaj Festivaloj tra la regiono. Establitaj fortocentroj pri tio ekzistas en Rusio; gravas evoluigi dokumentadon de la organizado de festivaloj, por ke nekonantoj povu tamen realigi festivalojn en novaj mondpartoj.

**Informkonsiloj**
Evoluigi pli bonajn gvidilojn pri la arto de informado kaj organizi pri tio trejnseminariojn.

**Turismo**
Rekonsistigi la turisman agadon tra la mondo, elpensi manierojn jungi la turisman allogon de la kaŭkaza regiono. UEA kaj TEJO nasku turisman programon, kiu ne limigas sin nur al UK kaj la IJK.

**Esperanto-Centroj**
Repripensi la funkciadon de E-Centroj, kaj esplori novajn vivipovajn iniciatojn, ankaŭ en la regiono.

**Trovi simillideanojn**
Pretigi projektojn kunlabore kun aliaj kulturaj aŭ sociaj movadoj, kiuj utilu reciproke.

**Transnaciaj kongresoj**
Esplori en la regiono la realigon de plurlandaj kongresoj, laŭ la modelo de la Trilanda Kongreso en 2016 inter Indonezio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

**Eldonprojektoj**
Apogi la eldonadon de manuskripte kaj elektronike preta baza kurso en la kartvela kune kun vortaro – ĉu fizike, ĉu elektronike en formato konvena por porteblaj komunikiloj. Tio okazu sekve de merkatesploro kaj konkreta buĝeta propono.

**Reteluzo**
Kreskigi la haveblon de enretaj prezentaĵoj (kiel Lernu.net) en lingvoj de la regiono, kun eluzo de la reklamebloj en sociaj medioj, kiel ekzemple *Facebook*.



Unue laboro, poste kulturo; scenoj el la 10a Mezorienta Kunveno en Kutaisi Fotoj SMG



## *Jaro de la Lernanto atingis Armenion*

En laŭdinda kunlaboro, la postkongreso de la 10a MK okazis en Erevano, Armenio, kiu proponis spektaklan kaj bone organizitan programon. Tio lasis malmultan tempon por prelegoj, sed trio okazis, inter ili unu pri la Jaro de la Lernanto, la komuna programo de ILEI kaj UEA, kiu venos al fino post tri monatoj en la 102a UK en Seŭlo. Frapa konstato estis la komunumo de kapablaj esperantistoj en la armena ĉefurbo. En du vesperoj partoprenis deko da lokuloj en la vesperaj programoj – kaj grandparte malsamaj personoj. La deziro inter ili por pli da internacia kontaktado estis klare konstatebla.






Denove, laboro antaŭ kulturo. Kadre de la Jaro de la Lernanto, armenoj kaj aliaj eksciis pri la projekto 'Amikumu.net'. Pliaj bildoj ĉi-paĝe el la monaĥejo Gegĥard. Protektata de Unesko.







Fotoj: SMG   Vortoj: 438

Por tuja uzo kaj plia diskonigo kun agnosko de la fonto: EKO de UEA.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.
**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.